# Progresa Lernolibro (pecoj)

発展エスペラント
(断片)

belmonto

B A B I L O  I

( Relerno )

S-ro Kim: (Frapas pordon.) Bonan matenon!

S-rino O: (Marfermas la pordon.) Jes!

S-ro Kim: Bonan matenon, sinjorino. Ĉu s-ro O estas hejme?

S-rino O: Jes, li estas hejme. Sed, pardonon, mi ne konas, kiu estas vi.

S-ro Kim: Ho, min pardonu! Mi estas nomata KIM, kaj estas amiko de li.

S-rino O: Ho, vi estas s-ro Kim! Li ĉiam parolas al mi pri vi. Eniru. Mi vokos lin.

(En ĉambro.)

S-ro O: Ho, mi longe ne renkontis kun vi, s-ro Kim. Kie vi estis?

S-ro Kim: Mi vojaĝis tra Kjuŝu dum monato, kaj restis en Kagoŝima semajnon.

S-ro O: Bele! Kiom vin envias mi.

S-rino O: (Eniras kun teo.) Jen nia malriĉa servo...

S-ro Kim: Ho, vin ne ĝenu, sinjorino. (Trinkas.) Bongusta.

S-rino O: Tio estas produkto en Ĉiran, Kagoŝima.

S-ro Kim: Ĉu vere? Do mi tion trinkis dum mia restado tie.

S-ro O: Vi nun parolas Esperanton frue. Al mi ŝajnas, ke vi multe ekzercis. Ĉu ne?

S-ro Kim: Ja, vere, mi estis lernantaĉo en la Esperanto-kurso okazita antaŭ tri monatoj. Tiam mi rekontis tiun ĉi internacian lingvon por la unua fojo en mia vivo. Mi ne povis bone paroli ĝin. Sed mi renkontis kun multaj esperantistoj dum mia vojaĝo, kaj spertis paroli kun ili.

S-ro O: Tio estas bona sperto. Sperto faras pli perfektan lingvon.

S-rino O: Ĉu vi ne havas bonkoron instrui tiun sperton al mi? Mia edzo instruis la lingvon al mi, sed mi ankoraŭ restas aĉa esperantistino.

S-ro O: Tio estas bona ideo! Mi esperas, ke mia edzino estu bona kamaradino, kaj povu frue paroli ankaŭ al gefil(?)

(1-1) S-rino O malfermis la pordon.

= La pordo estis malfermita de s-rino O.

1) La patrino donis lakton al sia bebo.
2) Li donis la libron al sia amatino.
   NB. Ne=Sia amatino estis donita libron de li.
3) En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron.
4) Ŝi prenis la danĝeran instrumenton de sia filo.
5) Kaj ŝi kisis lin sur la bela frunto. (FK 55/16)

(1-2) S-rino O malfermis la pordon.

| | | |
|---|---|---|
| fermi | fenestro | kun angoro sur vizaĝo |
| rompi | libro | antaŭ la gastoj |
| ŝiri | kesto | insultante sian patron |
| ĵeti | tirkesto | kun denaska delikateco |
| bruligi | tajpilo | post la grava decido |

(1-1,2)

(1-4) Mi estas nomata KIM. = Oni nomas min KIM.

= Mia nomo estas KIM.

1) Tia ago estas nomata rabo.
2) Kiel estas nomata tiu ilo?
3) La arbo, sur kiu kreskas pomoj, estas nomata pomujo.
4) Angla lingvo estas nomata internacia lingvo, sed tio ne estas vera.
5) Neĝo estas nomata „hima" en tibeta lingvo.

(2-1) Mi restis en Kagoŝima <u>semajnon</u>.

= Mi restis en Kagoŝima <u>dum semajno</u>.

1) Mi vojaĝis tra Kjuŝu dum monato.
2) Mi renkontis kun multaj esperantistoj.
3) Tiam li drinkis Napoleonon por la unua fojo.
4) Atendu momenton! Mi tuj revenos.
5) La knabo kuris la riveron kun bambua ŝipeto por meti sur la akvon.

(3-1) Mi esperas, ke mia edzino estu bona kamaradino.

= Mi esperas mian edzinon esti bona kamaradino.

= Mi esperas al mia edzino, ke ŝi estu bona kamaradino.

1) Ĉu vi deziras, ke ŝi revenu hejmon sola?
2) Mi esprimas mian elkoran senton, ke vi iru gehenon.
3) La lernejestro admonis kaj kuraĝigis Timoteon, ke li lernu pli diligente ol antaŭe.
4) Mi estas soifa. Mi volas trinki viskion.
5) Li kredis, ke ŝi nepre sukcesos.

(3-2) esperi, deziri, voli, kredi, fidi, dubi, pensi